

N. N. 32,

Es ist ein Ros entsprun-
gen

1. Es ist ein Ros entsprungen
aus einer Wurzel zart,
wie uns die Alten sungen,
von Jesse kam die Art
und hat ein Blümlein bracht
mitten im kalten Winter,
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,
davon Jesaja sagt,
ist Maria die reine,
die uns das Blümlein bracht.
Aus Gottes ewgem Rat
hat sie ein Kind geboren
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so kleine,
das duftet uns so süß,
mit seinem hellen Scheine
vertreibt's die Finsternis:
Wahr' Mensch und wahrer Gott,
hilft uns aus allem Leide,
rettet von Sünd und Tod.

...

N. N. 32,

Rozbranĉo
forĝermadis*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

...

N. N. 32,

Jen ĉiamviva
Rozo*tradukita de Leland
Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profet'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun impet'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vintra
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
la menciita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Ŝi naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-arom'
Heligas per Digloro
la vojon de la hom'.
Ja homo, tamen Di',
ĝi ŝarĝojn malpezigas
Kaj homojn savas ĝi.

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen. - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros' Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.